

Sud-Koreio bonvenigas partoprenon de KDPR en Vintraj Olimpikoj 2018



Irano: malgraŭ la alvoko al kvietiĝo de Hassan Rohani, la protestoj daŭras

Esperanto inspiras la estigon de NRO en Germanujo

Brulego detruis pli ol mil aŭtomobilojn

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Sud-Koreio bonvenigas partoprenon de KDPR en Vintraj Olimpikoj 2018

Plibonigi rilatojn inter la nordo kaj la sudo p. 03

Ses landoj fariĝis nekonstantaj membroj de Sekureca Konsilio de UN

Kuvajto, Eburbordo, Gvineo Ekvatora, Peruo, Pollando kaj Nederlando p. 03

Irano: malgraŭ la alvoko al kvietiĝo de Hassan ROHANI, la protestoj daŭras

Kontraŭ la potenco kaj la ekonomiaj malfacilaĵoj p. 04

Brulego detruis pli ol mil aŭtomobilojn

Liverpulo, Unuiĝinta Reĝlando p. 05

Esperanto inspiras la estigon de NRO en Germanujo

Bonveno p. 05

Pri la Esperanta Unesko-Kuriero

Unesko-kuriero disvastigas tra la mondo la idealon de homaro kunveninta en sia diverseco p. 06

Hodiaŭe

CICERONO; Matthías JOHANNESSEN; kaj Lacerto p. 08

Sud-Koreio bonvenigas partoprenon de KDPR en Vintraj Olimpikoj 2018

La Blua Domo, la sud-korea prezidentejo, lunde [01 jan 2018] bonvenigis la novjaran paroladon de la plej alta gvidanto de la Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) Kim Jong-un [김정은 kim tɕʌŋ.un], en kiu li esprimis la neceson plibonigi rilatojn inter la nordo kaj la sudo de la Korea Duoninsulo kaj la volon partopreni en la Vintraj Olimpikoj 2018 en *Pyeongchang*.



Park esperis, ke Sud-Koreio kaj la KDPR, la rekte koncernataj partioj de la demando de la Korea Duoninsulo, agos en respondeca maniero kaj trovos rimedon por mildigi la situacion kaj konstrui pacon en la duoninsulo. Park aldonis, ke se la Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang* sukcesos, ĝi kontribuos al paco kaj reakordiĝo de la Korea Duoninsulo, Nordorient-Azio kaj la mondo.

En sia novjara parolado, Kim Jong-un diris, ke Pjongjango volas trakti kun Seulo pri sia ebla partopreno en la Vintraj Olimpikoj 2018 en Sud-Koreio. Kim diris, ke 2018 estas grava jaro por la du landoj en la Korea Duoninsulo,

ĉar la KDPR festos la 70-an datrevenon de la fondo de la lando, kaj Sud-Koreio gastigos la Vintrajn Olimpikojn.

Yu

Ĉina Radio Internacia

Proparolanto de la Blua Domo PARK Soo-hyun diris en regula gazetara konferenco, ke la starpunkto de la Blua Domo estas konsekvenca, ke Sud-Koreio volas komenci dialogon kun la KDPR sen limigo de tempo, loko kaj formo, se por normaligo de duflankaj rilatoj aŭ solvado de la demando de la Korea Duoninsulo.

Ses landoj fariĝis nekonstantaj membroj de Sekureca Konsilio de UN

Kuvajto, Ekbordoj, Gvineo Ekvatora, Peruo, Pollando kaj Nederlando oficiale estas nekonstantaj membroj de la Sekureca Konsilio de la UN ekde ka 1a de januaro.

Krom Nederlando, aliaj kvin landoj servos kiel nekonstantaj membroj por du jaroj, ĝis la 31-a de decembro 2019, ĉar, laŭ interkonsento atingita en la elekto de la Ĝenerala Asembleo de la UN, Italujo kaj Nederlando dividos la oficperiodon de 2017 kaj 2018, tial Nederlando



servos ĝis la 31-a de decembro 2018.

Aliaj nekonstantaj membroj de la Sekureca Konsilio estas Kazahujo, Etiopujo, Bolivujo kaj Svedujo.

La Sekureca Konsilio konsistas el 15 membroj, kaj inter ili Ĉinujo, Francujo, Rusujo, Britujo kaj Usono estas la konstantaj membroj. La nekonstantaj membroj estas distribuitaj laŭ regionoj, kaj ĉiu el ili servas du jarojn. La Sekureca Konsilio okazigas elekton en ĉiu jaro por renovigi kvin nekonstantajn membrojn.

Yu

Ĉina Radio Internacia

Irano: malgraŭ la alvoko al kvietiĝo de Hassan ROHANI, la protestoj daŭras

Kvar tagojn post la komenciĝo de la manifestacioj

kontraŭ la
potenco kaj la
ekonomiaj
malfacilaĵoj, kiuj
tuŝis multajn
provincajn
urbojn kaj la
ĉefurbon
Teherano, la
prezidento,
Hassan ROHANI,
ekparolis por

alvoki al kvietiĝo kaj kondamni la
perfortojn. Li rekomendis areojn, en kiuj
la homoj povu esprimi siajn kritikojn.
Tamen manifestacioj daŭris ĉi-
dimanĉon la 31-an de decembro en
pluraj urboj de la lando. La noktaj
perfortoj okazigis 10 mortintojn en la
tuta lando, laŭ la irana televido.

Malgraŭ la alvoko de Prezidento ROHANI,
kaj la adoptitaj aranĝoj, sporadaj
manifestacioj okazis dimanĉon la 31-an
de decembro en almenaŭ deko da
provincaj urboj, kie la manifestaciantoj
atakis bankojn, publikajn konstruaĵojn
kaj eĉ religiajn lokojn. Tiuj manifestacioj
ŝajne estis malpli vastaj ol tiuj, kiuj
okazis sabaton [30 dec 2017] vespere.

Du personoj tamen estis pafmortigitaj
dum la protestoj, kiuj tuŝis la urbon
Izeh, sud-okcidente de Irano, asertis la
loka deputito Hedajatollah KHADEMI. Li
diris, ke li ne scias, ĉu la pafoj venis de

la manifestacioj, aŭ de la policistoj. Tiuj
ĉi sin moderigas, malgraŭ la perforto de
kelkaj manifestacioj. La rezulto de la
noktaj perfortoj atingas 10 mortintojn,
laŭ la irana televido. Post la surprizo de
la unuaj tagoj, la irana potenco reagis
fronte al la manifestacioj kelkfoje
perfortaj, kiuj de ĵaŭdo tuŝas multajn

provincajn
urbojn kaj
malpli vaste,
Teheranon.



**Admono
kontraŭ tiuj,
kiuj uzas
perforton**

La ministro pri
Internaj aferoj
lanĉis admonon

kontraŭ tiuj, kiuj uzas perforton kaj
instigas malordon, promesante ke ili
estos punitaj pro siaj agoj.

Same, la registaro limigis la aliron al la
sociaj retoj, por malhelpi la
manifestaciantojn kaj la opoziciajn
grupojn, bazitajn eksterlande, ke ili
uzadu ilin por alvoki al kolektiĝoj.

Prezidento ROHANI, forpuŝante la
perfortojn, provis samtempe kvietigi la
situation, dirante ke necesas krei
areojn, en kiuj la homoj povu esprimi
siajn kritikojn, kaj eĉ pace manifestacii.
Ĉiaokaze, la protestmovado estis
malforta en Teherano, kie nur pluraj
centoj da personoj manifestaciis, en
urbo kiu enkalkulas pli ol ok milionojn
da loĝantoj.

Neniam Milito Inter Ni

Brulego detruis pli ol mil aŭtomobilojn

En la parkumejo “*Kings Dock*” de la urbo Liverpulo, Unuiĝinta Reĝlando, granda brulego detruis pli ol mil aŭtomobilojn, inter la nokta dimanĉo (la 31-an de decembro) kaj frumatena lundo (la 1-an de januaro), laŭ informo fare de la loka polico.

La brulo estus estiĝinta per akcidenta maniero ĉe iu aŭto, kaj el tiu veturilo ĝi rapide disvastiĝadis. Ĉe la ĉirkaŭaĵo de brulego la homoj estis

devigitaj lasi siajn hejmojn, pro la fumo, kaj veni en rifuĝejojn.

Tiu parkumejo havas parkumlokojn por 1,6 mil aŭtomobiloj kaj tiam ĝi estis preskaŭ plena, pro la novjaraj festoj.

Pere de afiŝo en Tvitero la polico de *Merseysid* informis, ke ĉiuj veturiloj tie estis detruitaj de la fajro. La loka fajrobrigado bezonis ĉirkaŭ ses horojn por estingi la bruladon.



Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



Esperanto inspiras la estigon de NRO en Germanujo

Kreiĝis en Germanujo institucio kun Esperantlingva nomo. Temas pri la ne-registara organizo (NRO) *Bonveno*.

La elekto de tiu nomo ne estis hazarda. La institucio celas helpi rifuĝintojn kaj

persekutitojn pro politikaj, etnaj kaj religiaj motivoj.

Bonveno zorgas pri loĝejoj por homoj en tiaj situacioj en *Göttingen*, urbo situanta en la nordokcidenta regiono de Germanujo. Tie ankaŭ troviĝas *Herzberg-am-Harz*, la mondkonata “urbo de Esperanto”.

Esperanto Ilustrita

Pri la Esperanta Unesko-Kuriero

La 2-an de aŭgusto pasintan jaron aperis de kunlaboranto Paulo Sérgio VIANA artikolo “*Trezoro liveras al ni trezoron*”, en kiu li informis pri la Esperanta versio de Unesko-Kuriero.

Hodiaŭ mi volas ĝisdatigi la informojn kaj aldoni aliajn.

Sed antaŭe mi eksplikas la titolon – por tiuj kiuj ne legis la artikolon: Paulo Sérgio konsideras (ĝuste) la Unesko-Kuriero-n kiel “trezoron”, kaj Trezoro estas la (Esperanta) nomo de la ĉina kunordiganto kaj redaktoro de la revuo.

Pri la revuo la Direktorino de Unesko, Irina BOKOVA, diris en la unua numero en Esperanto:

Ekde sia naskiĝo en 1948 Unesko-kuriero disvastigas tra la mondo la idealon de homaro kunveninta en sia diverseco, unuiĝinta ĉirkaŭ universalaj valoroj kaj la fundamentaj rajtoj, kun la riĉeco de siaj kulturoj, de siaj konoj, de siaj faroj. La Kuriero estas ĉefa elemento de la identeco de la Unesko, kaj unu el la elstaraj instrumentoj de ĝia humanisma mandato.


La ses oficialaj lingvoj de UN – kaj Unesko – estas la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa. En ili la revuo estis publikigita ekde 1948 (kun interrompo inter 2012 kaj 2017), sed ekde 2010 ĝi aperas ankaŭ en la portugala. Kaj nun ankaŭ en Esperanto. Pasintan jaron aperis tri numeroj en la internacia lingvo. Ili estas elŝuteblaj senpage (vidu).

Pri la ekesto de la Esperanta versio la E-Vikipedio (vidu) informas:

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko,

kiuj kelkfoje respondis: «se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero». Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe la esperantistaro.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano TREZORO Huang Yinbao [黄银宝 Huáng Yínbǎo], direktoro de la Esperanto-Centro Ora Ponto en Ĉinujo.



La tradukantoj de la Esperanta versio vivas en pluraj landoj, ĝis nun en 18. Plej multaj tradukantoj nuntempe loĝas en Brazilo (4), Ĉinio (3) kaj Italio (3). Ĝenerale ĉiu voluntulo tradukas po unu artikolon, kelkfoje du aŭ eĉ pli. Evidente la artikoloj havas diversajn longojn kaj estas pli aŭ malpli facile tradukeblaj (depende de la temoj). Plej ofte oni tradukas el la angla aŭ la franca, t.e. oni uzas la anglan aŭ la francan version por traduki en Esperanton. Kelkfoje unu artikolo estas tradukata de du (tre malofte de tri) voluntuloj, kaj eblas, ke unu el ili uzas la anglan version, la alia(j) la francan. En la tri unuaj numeroj de Unesko-Kuriero neniuj artikolo estis tradukita el la araba, la portugala aŭ la rusa, nur unu el la hispana kaj nur du el la ĉina. Unu aŭ du rusoj tradukis ne el la rusa, sed el la angla, kaj kvar brazilanoj tradukis ne el la portugala, sed el la angla aŭ franca.

Krom la tradukantoj laboras ankaŭ provlegantoj. Sub ĉiu artikolo estas skribita la nomo de la tradukinto, kaj plurfoje ankaŭ tiu de la provleginto. Kelkfoje estas dirite ankaŭ, ke la traduko estis polurita de iu alia voluntulo. Pluraj provlegantoj kaj polurantoj ankaŭ faras tradukojn.


Mi trovis stranga, ke neniuj tradukis el la araba, portugala aŭ rusa, kaj mi demandis al TREZORO, la kunordiganto de la E-versio, kiel funkcias la distribuo de la tekstoj: Kiu tradukas kiujn artikolojn?

Jen kiel funkcias la sistemo:

Unesko dissendas unue la publikigotajn tekstojn en la angla kaj franca samtempe al ĉiuj redaktoroj de la aliaj versioj de la revuo (araba, ĉina, hispana, portugala, rusa kaj Esperanta). La redaktoro aŭ la vic-redaktoro sendas la tekstojn al ĉiuj Esperantaj tradukantoj, sed nur la anglaj kaj francaj tradukantoj povas komenci la tradukadon (de tekstoj kiujn ili elektas inter la publikigotaj). La alilingvaj tradukantoj devas principe atendi ĝis la apero de artikoloj en sia gepatra lingvo. Tamen, ĉar ne estas sufiĉe da tradukantoj kiuj estas denaskaj parolantoj de la angla aŭ franca, oni akceptas aliajn voluntulojn – se ili bone regas la anglan aŭ francan.

En la numero de pasinta oktobro de la oficiala organo de UEA (la revuo Esperanto) oni atentigis pri la fakto, ke kvankam la portugala ne estas oficiala lingvo de UN kaj Unesko, ĝi estis akceptita de Unesko kiel lingvo de la Kuriero kaj de la retejo. Do evidente la apero de Esperanta versio de Unesko-Kuriero estas granda paŝo antaŭen. “Esperanto apogata de Unesko havas grandan esperon”

Herbert A. WELKER
Esperanta Retradio



CICERONO

Marko Tulio CICERONO (latine: **Marcus Tullius Cicero**; naskiĝis la 3-an de januaro -106 en Arpino, Italio, mortis la 7-an de decembro -43 en *Formia*) estis oratoro kaj ŝtatestro de Romio, ĝenerale konsiderata la plej granda latina proza stilisto.

En Esperanto aperis: *Songô de Skipiono*; *Antologio Latina*.

Vikipedio

Matthías JOHANNESSEN

Matthías JOHANNESSEN (n. 3-an de januaro 1930) naskiĝis en Rejkjaviko, estis islanda verkisto.

En Esperanto aperis: *Dimanĉa prediko*.

Vikipedio



Bildo de la tago

Anolis marmoratus.

Vikipedio